



8-6-1974

CGC Nº
00406 504/1000-06

Conselho Brasileiro de Esperanto

BRASÍLIA - DISTRITO FEDERAL

PRESIDÊNCIA

Rua Galeão Carvalhal, 31 - AP. 73 Caixa Postal 07 - 1182
Telefone 4-8033
11.100 - Santos (SP)

SECRETARIA

Telefone 42-9090
70.000 - Brasília (DF)

ANO IV 26

JUNHO DE 1977

ÓRGÃO OFICIAL DO BKE

Redação: MARIA ALMADA

BALOTADO DE BRAZILA KONSILANTARO DE ESPERANTO

Post pluraj alvokoj al la organizaĵoj, kiuj aktive partoprenas nian BKE, petante iliajn reprezentantojn voĉdoni por iu alia estraro aŭ reelekti la nunan, ĝis la mezo de la nuna monato, nur du trionoj aktuala. Uno triono ĝis nun ankoraŭ ne respondis.

La du trionoj unuanime favoras la nunan direktoraron kun laŭdoj. Tio signifas, ke ĉi tiu direktoraro kontentige aktivis dum la unuaj tri jaroj de sia laboro.

Ek de la 8-a de junio 1977 la estraro daŭrigas sian klopodon unuigi la anaron kaj sincere kunlaboras kun ĉiuj. — BKE esperas, ke la nepartoprenantaj organizaĵoj, kiuj ankoraŭ restis for de sia konsistiga-membraro, rezonu kaj en tiu nova periodo eventuale en la organizaĵon kunlaborante kun la klopodemaj gesamideanoj de nia vasta lando, apogante egale nian laboron.

Nia vicprezidentara reto certe kreskos ankoraŭ pli kaj pli, kaj nia Esperanto-movado en sia naŭdekjara ekzisto brilos.

BKE-anoj bedaŭras la silenton de unu triono respondeculoj, kiuj devus aktivi pli, elmontri bonvolon kaj solidarecon, inkluzive fidelecon al BKE, sed precipe al idealo de Zamenhof.

Neniam okazis ĝis nun en la brazila Esperanto-movado, ke tiom da eminentaj esperantistoj aktivus samtempe kiel okazas

nuntempe. La vicprezidentaro de BKE estas gratulinda, tre laŭdinda kaj imitinda kunularo.

Karaj gesamideanoj, unuiĝu ni en BKE!

NI KONDOLENCAS

En la komenco de junio 1977 forlasis nin nia kara kaj tre estimata samideano D-ro Jatir Gonçalves Vieira, el S. João da Boa Vista, kune kun lia simpatia edzino.

Ni ne kuraĝas diri, ke li mortis, ĉar li, kiel bona spiritisto, estis konvinkinta, ke li neniam mortos.

Bedaŭrinde la akcidento kun lia aŭtomobilo forrabis nian vicprezidenton. Samideano Jatir vigle aktivis en S. João da Boa Vista kaj en la najbara regiono. Li organizis bibliotekon pri Esperanto, kreis belartan konkurson pri Esperanto, gvidis kursojn kaj partoprenis niajn seminariojn fidele.

Ni kondolencas liajn familianojn.

MONO RICEVITA

Ni ricevis kaj kore dankas la jenajn sumojn, por helpi la aperadon de nia Informa Bulteno:

Antonio João F. Padilha	Cr\$ 30,00
Elvira Fontes	100,00
Sumo	130,00

ATENTU!!

En la kadro de la XII-a Seminario de Esperanto okazonta en Santos (SP) estos kunsido de Brazila Konsilantaro de Esperanto por konfirmi la nunan estraron de la organizo, sed ankaŭ por pritrakti plurajn aferojn kun la vicprezidentaro. Ni invitas do niajn karegajn kunlaborantojn ĉeesti tiun kunsidon, eluzante la gravan eventon. Antaŭdankon al ĉiuj.

LIVRARIA "PINGO DE LUZ"

A pequena gramática do Prof. F.S. Almeida, adaptada para o ensino do Esperanto a brasileiros, acha-se à venda nesta livraria, além de outros livros sobre espiritismo e Esperanto. Rua Marechal Deodoro, 11 — CEP 11.100 em Santos (SP).

GAZETOJ RICEVITAJ EL PLURAJ URBOJ

Ni ricevis kaj tre kore dankas, la jenajn gazetojn:

Jornal Espírita, Folha da Tarde, o Democrata, Tribuna dos Municípios, Correio Fraternal do ABC, Matutino Popular, Diário de Notícias, Jornal da Manhã, kiuj havas interesajn artikolojn pri Esperanto, kaj nin informas pri la movado en siaj regionoj.

Inter la plej elstaraj sciigoj ni rimarkis, ke la gazeto el Salvador-BA, "Tribuna dos Municípios" aperigis tiun de nia kara vicprezidentaro José Saraiva Matos informante, ke tiu gazeto estas preta publikigi artikolojn pri Esperanto, apogante nian movadon. Tiu apogo estas bonvena kaj ni tutkore dankas al direktoro de la gazeto, S-ro Edgar Viana, pro lia afableco.

JUIZ DE FÓRA (MG) — La gazeto "Diário Mercantil" de tiu progresema urbo aperigis gravan artikolon pri Esperanto, de nia vicprezidentaro Prof-ro José Passini, kiu estis intervjuita, informante detale pri la signifo de la Internacia Lingvo kaj pri ĝia uti-

leco kiel interkomunikilo de la popoloj.

PORTO ALEGRE (RS) — La gazeto "Correio do Povo" ankaŭ publikigas ofte artikolojn pri Esperanto dank'al nia diligenta kaj kapabla vicprezidentaro D-ro Belmonte de Abreu.

Li proponas la propagandon pri Esperanto en la poŝtoŝtupoj, kie la plimulto eĉ ne aŭdis pri la internacia lingvo. Ofte okazas alveno aŭ sendado de poŝtaĵoj en Esperanto, do estus utile disvastigi la lingvon en tiun medion.

PORTO ALEGRE (RS) — Do nosso vice-presidente, Dr. Modesto Belmonte de Abreu, recebemos a seguinte nota, que, pela sua importância transcrevemos a seguir: "A biblioteca da "Esperantista Sociedade de Porto Alegre", vem de ser registrada oficialmente no Conselho Regional de Biblioteconomia da 10-a Região, sob o Nº 10/251 do Ministério do Trabalho. Essa biblioteca conta mais de 600 livros para consulta dos sócios e, além de literatura, ciência, história e livros didáticos, ela possui obras primas de literatura universal, editadas na língua Esperanto, fornecendo valioso subsídio lingüístico para escolas e universidades. O movimento cultural esperantista do país, vem fazendo esforço para conseguir que essa língua de utilidade na carreira diplomática, seja empregada no Instituto Rio Branco, entre as línguas não tradicionais, dado o sucesso que vem obtendo no mundo".

Gratos pela colaboração, esperamos receber novos informes como o atual, de grande relevância para a divulgação do Esperanto.

PELOTAS (RS) — Complementando notícia que nos forneceu nosso vice-presidente Dr. Paulo Domingos Caruso e que publicamos em nosso Boletim nº 23, de março último, nosso vice-presidente Dr. Belmonte de Abreu que se encontrava em Pelotas por ocasião da fundação da "Esperantista Sociedade de Pelotas" informou-nos, entre outras coisas, os nomes dos diretores que foram eleitos para a novel sociedade:

Presidente: — Dr. Paulo Domingos Caruso; vice-presidente, Prof. Evandes Barbosa;

Tesoureiro, Dr. Claudiomar Lopes Barcelos; e bibliotecária, a senhorita Fátima Azevedo Barbosa. Na cerimônia de posse da diretoria falou o Dr. Belmonte de Abreu, na qualidade de orador oficial, tendo sido efusivamente aplaudido pelos presentes. **BAURU (SP)** — O "Jornal da Tarde" em sua edição de 18 de maio último publicou interessante notícia, que reproduzimos, alusiva a trabalho de nosso vice-presidente:

"PALESTRA SOBRE ESPERANTO PROFERIDA NO ROTARY-NORTE

Como convidado especial, o Professor Euclides Geraldís de Carvalho, presidente da Sociedade Bauruense de Esperanto, fez uma palestra sobre a língua neutra internacional durante a reunião-almoço de ontem, no Bauru Tennis Clube, do Rotary Bauru Norte, estando presentes os presidentes dos três Rotaries locais: Djalma de Oliveira, do anfitrião; João Silveira Filho, do Rotary Bauru e Hely Felipe, do Rotary Oeste. Esteve presente ainda, o Governador do Distrito 451, do Rotary Internacional, João Batista Lopes.

O dirigente esperantista, realçando a significação do Esperanto, disse o que é a língua neutra inter-nações, fazendo, com muita propriedade, colocação do problema da comunicação entre povos de línguas diferentes. Mostrando ao aclético auditório a beleza, o sentido moderno e a facilidade de assimilação do Esperanto, o Prof. Euclides de Carvalho fez também demonstração do funcionamento da língua neutra, pondo em destaque que uma das principais características da língua é a neutralidade. Traçou, igualmente, a personalidade de Zamenhof, o criador do Esperanto.

Muito aplaudido no final, o presidente da SBE produziu uma palestra que agradeu pelo seu conteúdo e pelos conceitos emitidos, bem como pela sua facilidade de expressão".

O Conselho Brasileiro de Esperanto congratula-se com seu vice-presidente Prof. Euclides Geraldís de Carvalho pelo seu excelente trabalho em prol de nossa causa. **BELO HORIZONTE (MG)** — El la ĉefurbo de Minas Gerais D-ro Helio F. Aderne

sciigis nin, ke li estis invitita partopreni la reton de la delegitoj de U.M.E.A. — Universala Medicina Esperanto-Asocio, kaj ke li konsentis pri la reprezentado.

Ni kore gratulas nian samideanon pro tiu honora posteno.

NITERÓI (RJ) — Nia kara samideano D-ro Joaquim do Couto transkribis por nia Informa Bulteno la jenan sciigon, kiun publikigis la gazeto "Fluminense", de la 3-a de majo pasinta, devenintael Brazilio (FD), havanta interesajn pecojn: "...o Presidente conversou com os jornalistas durante cerca de vinte minutos, auxiliado por uma intérprete que chegou a irritá-lo, porque resumia demais o que dizia ou até mudava o sentido de algumas afirmações"... "A certa altura, Geisel chegou a interrompê-la para fazer uma correção".

Kaj nia informanto aldonis: "Mais uma prova, não acha, da necessidade do Esperanto, como segunda língua de cada povo?"

Sendube, kara D-ro Couto, kaj ni klopodas malaperigi la lingvan ĥaoson.

SANTOS (SP) — La Prezidanto de BKE ĵus publikigis simplan lernolibron (vade mecum) pri Esperanto. Ĝi estas adaptita al brazilaj kondiĉoj, por plifaciligi la lernadon de la internacia lingvo. Instruistoj kaj memlernantoj ĝin povas utiligi. La prezo: Ekzemplero Cr\$ 10,00. Pli ol dek ekzempleroj ricevas rabaton de 20%. Oni povas mendi per poŝtmandato al F. S. Almada - Rua Galeão Carvalho, 31-ap. 73, CEP — 11.100 — Santos (SP).

TAUBATÉ (SP) — La gazeto "O Taubateano" aperigis la jenan gravan sciigon: "Assembléia Legislativa homenageou o Major Gilberto Silva Velho.

A Assembléia Legislativa de São Paulo, em sessão do dia 11 de abril último, por requerimento do deputado Osíro Silveira, lavrou em ata voto de congratulações ao Major Gilberto da Silva Velho, por seu trabalho de âmbito nacional, na divulgação do idioma Esperanto.

Em sua justificativa, o deputado Osíro Silveira, disse que o homenageado, desde o ano de 1971, tem viajado e promovido

do exposições esperantistas em muitas cidades brasileiras.

Respondendo a uma pergunta, o Major Silva Velho disse que as pessoas interessadas, no Vale do Paraíba, em entrar em contato com o Movimento Esperantista, deverão dirigir-se ao Delegado ou Líder de sua respectiva cidade, ou da cidade mais próxima, como, em Taubaté, ao sr. Astério Braga ou Altivo Medeiros; em Pinda, ao Dr. Waldomiro de Abreu; em Caçapava, ao próprio Major e em S. José dos Campos, ao sr. Miguel Rodrigues".

Ni el tuta koro gratulas nian senlakan vicprezidanton pro la meritita omaĝo.

SÃO PAULO (SP) — A Assembléia Legislativa do Estado de São Paulo homenageia também a Associação Paulista de Esperanto: "REQUERIMENTO Nº 1.178, DE 1977.

"Requeremos, dentro das formalidades regimentais, seja consignado na Ata dos nossos trabalhos um voto de congratulações com a Associação Paulista de Esperanto, pela inauguração de sua nova sede, à Av. S. João, 1.333-2º andar, conjunto 21, nesta Capital.

Requeremos, outrossim, seja dada ciência desta deliberação às seguintes pessoas: Profa. Elvira Fontes — DD. Presidente da Associação Paulista de Esperanto — Avenida São João, 1.333, 2º andar, conjunto 21 — Capital.

Jornalista Nelson Silveira — Av. S. João 1.333, 2º - c/21, Capital.

Francisco de Souza Almada — DD. Presidente do Conselho Brasileiro de Esperanto, Rua Galeão Carvalhal, 31 - apto. 73 — Santos (SP) — CEP. 11.100.

Justificativa — O Esperanto é uma língua internacional, criada por Lázaro Luiz Zamenhof e tem no Brasil grande desenvolvimento, graças a inúmeros pioneiros que acreditam na tentativa, hoje em realidade, de criação de uma língua comum a todos os povos, que os unisse e destruísse as barreiras impostas pelas línguas diversas.

Em São Paulo destacou-se o movimento, que hoje constitui a Associação Paulista de Esperanto.

É, pois, justa a homenagem!
Sala das Sessões, em 7/6/77
a) Osíro Silveira".

MANCHETE KAJ TV-GLOBO — Tiuj du gravaj diskonigiloj prezentis al ni interesajn raportojn pri Esperanto. Manchete aperigis intervjuon de la geedzoj Gratapaglia informante pri la vivo en "BONA ESPERO", bieno, kiun ili prizorgas edukante infanojn, kiuj ne konas siajn gepatrojn. Ili studas kaj lernas eĉ la internacian lingvon Esperanto por komunikiĝi kun fremdaj vizitantoj.

La TV-Globo siavice aperigis vivantan scenon de tiu bieno, montrante la vivmanieron de ĝiaj loĝantoj, kaj la belaĵojn tie ekzistantajn.

S-ro Inĝeniero Giuseppe Gratapaglia, ĉef-delegito de la Universala Esperanto-Asocio estas ankaŭ vicprezidanto de BKE por "Internaciaj Rilatoj". Lia edzino S-ino Ursula Gratapaglia estas granda kunlaboranto en liaj laboroj, instruante la infanojn deĵorantaj en la bieno.

LINGVAJ PRIKOMENTOJ

(Daŭrigo)

"Dum la vespero mi kelkfoje iras al teatro".

- Prefere: "Vespere mi fojfoje iras en teatron". — "Sur la blua ĉielo tri birdoj flugas". — Kial "sur"? — Prefere: "Alte en la blua ĉielo flugas tri birdoj". — En alia loko (oni analizas erarojn prezentatajn en Esperanto-libro) ni trovas jenajn frazojn: "Apud la domo alta verda arbo staras". — La vortordo estas malbona. Kial meti fine de la frazo la vorton "staras"? — Ĉar ĝi staras frazfine, ĝi estas akcentita. Kial akcenti ĝin nenecese? Tio havus sencon nur, se oni parolus pri arboj, kiuj parte staras kaj parte kuŝas. Do oni diru: "Apud la domo staras alta verda arbo". Estus ankaŭ bone diri: "Apud la domo staras alta arbo verda", sed tio havus sencon nur se oni volus akcenti la "verdecon" de la arbo. La samo validas por la frazo: "Sub la lampo viro sidas". Do simple ni diru: "Sub la lampo sidas viro". — Oni devas rigore atenti la ĝustan vortordon. Malbona vortordo estas plie: "Mi ankaŭ rigardos la revuojn", anstataŭ "Ankaŭ mi rigardos la

revuojn". Tio estas, ne nur la aliaj, sed ankaŭ mi". — "Mi ankaŭ rigardos la revuojn" povus signifi "mi ne nur aĉetos ilin, sed ankaŭ rigardos. Malbona estas ankaŭ jena vortordo: "En la koncertejo jam multaj ĉeestantoj sidis". Kial la vorto "sidis" estas akcentita? Tio havus sencon nur se la ĉeestantoj havus ankaŭ la eblecon "kuŝi", kaj oni volas akcenti, ke multaj ĉeestantoj jam sidis. Oni formu la frazon jene: "En la koncertejo sidis jam multaj ĉeestantoj". — Malbona estas: "Tiu koncertojam ka, estis ludita en la pasinta dimanĉo, sed pro la sukceso ĝi estos ripetata hodiaŭ" — Malĝusta estas la vorto "sed" ĉar tiu ĉi kunordiga konjunkcio montras kontraŭecon, malsamecon aŭ diferencon inter tio, kio antaŭas kaj tio, kio sekvas. Oni atentu, ke tia kontraŭeco ne ekzistas. Do ĝusta estas la konjunkcio "kaj". — Tial: "ludita en la pasinta dimanĉo, kaj pro la sukceso" . . . La konjunkcion "sed" oni uzas ezeemple: "Stalo estas fleksebla, sed fero ne". — Aŭ la Esperanto-lingvo estas facila, sed la germana ne". — En ambaŭ frazoj temas pri kontraŭeco. Aliloke: "Vi ankaŭ parolas la internacian lingvon" — La vortordo devas esti: "Ankaŭ vi parolas la internacian lingvon". Diri: "Ankaŭ parolas" havus signifon nur se oni supozus, ke kelkaj nur skribas la internacian lingvon kaj deziras akcenti, ke la aliaj ankaŭ ĝin parolas. — La artikolon "la" oni uzas ankaŭ por anstataŭi la posedan adjektivon, speciale por montri korpoparton aŭ veston. Ekz.: "Elpiki al iu la okulojn" anstataŭ: "Elpiki al iu liajn okulojn"; "Li rompis al si la kapon" anstataŭ: "Rompi al si sian kapon"; "Ĝentile li levis la ĉapelon" anstataŭ: "Ĝentile li levis sian ĉapelon". — Ankoraŭ "Brakoj kaj kruroj estas niaj membroj". — Mankas la artikolo. Devus esti: "La brakoj kaj la kruroj estas" . . . — Malbone estas diri: "Kruroj kaj piedoj subtenas kaj portas nin", anstataŭ: "La kruroj kaj la piedoj subtenas" . . . — Aliloke: "Ĉu vi ankaŭ kuŝus sub arbo?" . . . anstataŭ: "Ĉu ankaŭ vi kuŝus sub arbo?" — Jes, elefanto ankaŭ estas besto", anstataŭ "Jes, ankaŭ elefanto estas besto". "Ĉu vi ofte vizitas lin?" — anstataŭ: "Ĉu vi ofte lin vizitas?" — En alia loko: "Kia bedaŭro!" Anstataŭ: "Kia domaĝo!" Ankoraŭ: "Mi esperas, ke baldaŭ vi estos sana" . . . ke vi baldaŭ estos sana". (Daurigota)

LIVRARIA "ESPERANTO" — Além de livros em Esperanto e artigos escolares, esta livraria vende a pequena gramática do Prof. F.S. Almada, adaptada para o ensino do Esperanto a brasileiros. Endereço: — Rua Libero Badaró, 466 — CEP 01.008 — São Paulo. SP.

BRAZILIO (FD) — La hejmo de niaj karaj gesamideanoj Antonio kaj Vera Morano riĉiĝis kun la naskiĝo de ilia fileto Gustavo. Ni gratulas genevojn de nia presidanto kaj geamikojn.

XII—SEMINARIO DE ESPERANTO — Kiel oni jam scias, de la 14-a ĝis la 17-a de julio venonta, okazos en nia urbo la 12-a Seminario de Esperanto. Por ke ĝi estu elstara evento, ni esperas, ke multaj samlandanoj kaj eĉ eksterlandanoj partoprenu ĝin. Rilate hotelojn, pensionojn, oni devas anticipi mendi, ĉar temante pri feriperiodo estas konsilinde ne heziti, mendum tu, ĉar tiam ni havos multajn vizitantojn.

La kunordiganto — Kultura Kooperativo de Esperantistoj — povas lokigi nur 40 gejunulojn, kiujn la Prefektejo gastigos. Centro Esperantista de Santos ne respondecas pri tiu gastigado; ĝi nur aranĝis ĝin, do atentu pri la afero!

BRAZILIA ESPERANTO-LIGO — Laŭ cirkulero de BEL, de la 13-a de la nuna monato, oni invitas al Ordinara Ĝenerala Kunsido okazonta la 2-an de Julio de la kuranta jaro, je la 4,30 h postagmeze, kun la jena tagordo:

- a) elekto de Estrarano; b) elekto de konsilanto; c) kotizo por 1978; kaj ĉ) ĝeneralaj temoj.

VINTRO

Julio Baghy

Vidu, falas en silento,
Blankaj negêretoj,
Pie vagas sen la vento,
Kvazaŭ anĝeletoj.

Tuta lando jam vestiĝis
Per la blanka vesto,
Ĉar naturo prepariĝis
Por la vintra festo.

Laste aperis!

La 14-an de junio 1977-a la DIARIO OFICIAL — Estado de Pernambuco aperigis Dekreton:

"Art.1º . Fica instituído o ensino de Esperanto nas Escolas do Estado, a ser ministrado em caráter optativo, na última série do primeiro grau e na primeira série do segundo grau".

Jen nova sukceso de la brazilaj esperantistoj! Nia vi prezidanto s-ano Amaro Pinangé Soares, efike laboradas ĉe la lernejoj por enkonduki Esperanton en ilin.

La instruado de la lingvo ne estas devigata, sed laŭvola.

La direktoraro de Brazila Konsilantaro de Esperanto, gratulas al s-ano Pinangé Soares pro lia efika laboro kaj deziras grandan sukceson en estonteco.

O MUNDO NECESSITA DE POESIA

Ato de Caridade

Djalma Andrade

Que eu faça o bem, e de tal modo o faça,
que ninguém saiba o quanto me custou.

— Mãe, espero de ti mais esta graça:

Que eu seja bom sem parecer que o sou.

Que o pouco que me dê me satisfaça
e se, do pouco mesmo, algum sobrou,
que eu leve esta migalha aonde a desgraça
inesperadamente penetrou.

Que a minha mesa, a mais tenha um talher
que será, Minha Mãe, Senhora Nossa,
para o pobre faminto que vier.

que eu transponha tropeços e embaraços.
Que eu não coma, sozinho, o pão que possa
ser partido, por mim, em dois pedaços.

• • •

CRIANÇA

Fernandes Soares

Quando você duvidar
e estiver sem esperança,
aprofunde o seu olhar
nos olhos de uma criança!